Heinrich Heine,

Libro de la kantoj, Junaĝaj suferoj, III

tradukita de Manfred Retzlaff

Solece tra tiu arbaro
Ĉagrene promenas mi;
Jen venas malnova revaro,
La koron eniĝis ĝi.

Ho, kiu vin instruintas,
Aera birdaro vi!
Se mia kor' vin aŭdintas,
Denove doloras ĝi.

Ja aŭdis mi fraŭlineton,
Ĝin ĉiam kantis ŝi,
Kaj tiam la vorteton
Ekkaptis birdoj ni.

Neniam rakontu vi tiun
Vorteton plu al mi!
Mi fidas ja neniun,
Vi birdoj, plenegaj de sci'.

Ho, lasu al mi la ĉagrenon,
Ne ŝtelu ĝin for de mi.
Atendas mi ŝian revenon,
Por ĉiam sopiras al ŝi.

Traduko de la Germana poemo "Buch der Lieder, Junge Leiden, III" de Heinrich Heine *(∗1797-12-13 – †1856-02-17) en Esperanton de* Manfred Retzlaff *(∗1938-11-04) en 1984.*

MR-134 / Arg-701-1412 (2012-12-06 11:36:03)